# SUDFRANCA STELO

**Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »**

*5, Quai Vauban,* **PERPIGNAN** *(P.-O.) - Telefono 34-38-84*

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o- NUMERO 3 -o-o-o-o- JULIO 1961 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-


## D I M A N Ĉ O N 2 an D E J U L I O

## AMIKA REGIONA RENKONTIĜO EN Q U I L L A N ( A u d e )

Niaj aktivaj samideanoj de QUILLAN invitas tutkore ĉiujn esperantistojn de la regiono ĉeesti dimanĉon 2an de Julio 1961 amikan renkontiĝon esperantistan en tiu bela urbo. Neniu kotizo estas pagenda. Temas pri amika kunveno dum kiu oni gaje babilos kaj praktikos nian lingvon. Jen la provizora programo :

Je la 10a horo : Renkontiĝo en la Placo Raoul de Volontat, QUILLAN. Amika kunveno.
Je la 12a horo : Honora Vino en la Urbodomo. Ekspozicio.
Je la 13a horo : Kampara tagmanĝo en la belega parko de la FORGE, sub la pinarboj, apud rivero Aude. (Ĉiu partoprenanto devas kunporti la manĝaĵon).
Posttagmeze : Libera tempo por konversacio, promenado, danco, ludoj, ktp.

Se vi deziras pluajn informojn, turnu vin al S-ro. Pierre Régnier, 11 Rue de la Mairie, QUILLAN (Aude).

---

## KAMPADEJO ZAMENHOF INAŬGUROTA 23an DE JULIO EN VALLON - PONT D'ARC (ARDÈCHE)

Kiel vi scias, laŭ la informoj aperintaj en "Franca Esperantisto", la urbestraro de Vallon - Pont d'Arc decidis unuanime doni la nomon de D-ro. Zamenhof, kreinto de Esperanto, al la publika kampadejo de tiu ĉi bela sudfranca urbo situanta apud rivero Ardèche en mirige pentrinda turisma regiono.

La inaŭguro de "Camping Zamenhof" okazos dimanĉon 23an de Julio. Okaze de la grava evento, oni aranĝis Internacian Ferian Semajnon de la 22a ĝis la 30a Julio 1961.

Ni esperas ke multaj sudfrancoj partoprenos ĝin. Vi povas peti komplementajn informojn al : Groupe Espérantiste du Vivarais, Chemin de Baza, AUBENAS (Ardèche), aldonante afrankon por la respondo.

---

## H I S T O R I A D E C I D O D E L A P O L A R E G I S T A R O

Lastmomente ni ricevis sensacian novaĵon : la registaro de la Pola Respubliko decidis krei devigajn kursojn de Esperanto en 50 lernejoj kaj ankaŭ en ĉiuj porinstruistaj seminarioj de la lando. Sur la venonta numero de "Franca Esperantisto" vi trovos pli detalajn klarigojn pri tiu sensacia evento kiu eble estas la komenca punkto de la sopirata oficiala akcepto de Esperanto ĉie tra la mondo. La fina venko malrapide, sed nedubeble alproksimiĝas. Tiu ĝojiga fakto devas taŭgi kiel stimulilo por nia entuziasmo kaj sindono. Ni devas perfektigi nian scion pri la lingvo kaj esti pretaj por la kazo ke nia helpo estos necesa por formi la estontajn instruistojn de la Internacia Lingvo.

Ĉu Polujo estas antaŭdestinita solvi la lingvan problemon en la mondo ? En tiu lando naskiĝis la genia kreinto de Esperanto, D-ro. Zamenhof. Nun ĝi donas la ekzemplon al la ceteraj landoj per la enkonduko laŭgrada de la deviga instruado de Esperanto. Ĝi meritas, do, la dankemon kaj aplaŭdon de la tutmonda esperantistaro.

---

JARABONO DE NIA REGIONA BULTENO "SUDFRANCA STELO" : Por kovri la kostojn de multobligado kaj sendo, ni fiksis kiel jarabono 1 N.F. , sendebla al la konto de Fédération d'Esperanto Languedoc-Roussillon, 5 quai Vauban, Perpignan, C.C.P. 956.28 Montpellier.

## M A L G R A N D A   R E G I O N A   K R O N I K O

Nia regiona kongreso en Armissan estis agrabla okazo revidi malnovajn amikojn, interrilatigi novajn esperantistojn kaj praktiki nian lingvon. Dank'al la sindonemo de la esperantistoj de Armissan, precipe de ĝia honora prezidanto s-ro. Dézarnaud, urbestro, kaj de nia vigla dekano s-ro. Escaré, nia renkontiĝo brile sukcesis.

La 2a Pedagogia Esperantista Semajno en Perpignan okazis de la 28a de Majo ĝis la 3a de Junio. S-ro. André Ribot prelegis en Ecole Racine kaj en Ecole Normale. La Departementa Direktoro de P.T.T., s-ro. Cazes, la Ĉefo de la Departementa Servo de la Junularo kaj Sportoj, s-ro. Gervais kaj aliaj elstaraj personoj ĉeestis kunvenon dum kiu nia Prezidanto, s-ro. René Llech-Walter, prezentis la Esperanto-ekspozicion per diapozitivoj de s-ro. Lentaigne kaj faris efikan demonstracion de la genia simpleco de la esperanta gramatiko.

En Saint-Laurent-de-la-Salanque (P.O.), nia vigla samideano s-ro. Escande, instruisto, gvidas Esperanto-kurson ekde pasinta monato Marto al grupo da infanoj. La 8an de Junio, nia Prezidanto, s-ro. Llech-Walter, vizitis la kurson kaj prezentis kolekton da lumbildoj pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj la diapozitivojn de S-ro. Lentaigne.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

## E K S P O Z I C I O   P E R   D I A P O Z I T I V O J   K A J   S O N B E N D O

Nia sindona samideano s-ro. Léo Lentaigne, de Montpellier, pretigis antaŭ kelke da tempo cirkulantan ekspozicion pri Esperanto. En ses paneloj de grandaj dimensioj, li kolektis valorajn dokumentojn pri nia lingvo. Libroj, turismaj kaj komercaj broŝuroj, jarlibroj, gazetoj, revuoj, interlerneja korespondado, internaciaj kongresoj, filatelio, ĉio, kio spegulas la valoron de Esperanto kaj ĝian praktikan aplikadon estas lerte kombinita en ĝi.

Tiu ekspozicio, vere interesa, estas iom malfacile transportebla. Ĝia pezo estas 40 kg. Sed s-ro. Lentaigne nun solvis la problemon. Li reproduktis per koloraj diapozitivaj fotoj la tutan ekspozicion. Tiuj diapozitivoj povas esti projekciataj sur ekrano aŭ eĉ eventuale sur blanka muro, per normala projekciilo. Entute estas 30 diapozitivoj.

S-ro. Lentaigne pretigis ankaŭ prelegon kun komentoj pri la ekspozicio, en franca lingvo, kun trafaj argumentoj pri nia lingvo, sur magnetofona sonbendo. La daŭro estas proksimume 25-minuta.

Tiuj, kiuj deziros profiti tiun ĉi valoran materialon okaze de publika demonstracio, povas ĝin lui je malalta prezo (4 NF plus sendokosto). Tiu sumo kompensos la koston de la diapozitivoj kaj sonbendoj kaj ebligos la pluan eldonadon de Esperantaj foto-dokumentoj. Vi povas peti informojn al s-ro. Lentaigne, 3 Avenue de la Gaillarde, MONTPELLIER (Hérault), indikante eventuale la teknikajn trajtojn de via magnetofono.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

## R O L O   D E   N I A   R E G I O N A   B U L T E N O

Regiona bulteno neniel devas konkuri kun nacia aŭ internacia revuo. Tial, jen nia celo : esti interligilo de la esperantistoj de la regiono, informi ilin pri la renkontiĝoj kaj aranĝoj kiuj plej rekte interesas ilin. Literaturaj, sciencaj artikoloj, detala informado pri enlanda kaj eksterlanda Esperanto-movado, ĉio ĉi apartenas al la sfero de la naciaj kaj internaciaj Esperanto-gazetoj, kiujn ni insiste rekomendas aboni.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage en Esperanto de 16.30 ĝis 17.00 per mallongaj ondoj je 25 m., 31 m. kaj 42 m.

RADIO ROMO elsendas en Esperanto marde, merkrede kaj vendrede, de 18.55 ĝis 19.10 per mallongaj ondoj je 30 m., 41 m. kaj 50 m.

PARIZO (FRANCE III) elsendas ĵaŭde sian Esperanto-kurson de 9.30 ĝis 9.40 per ondo je 290 metroj. Pri aliaj stacioj, bonvolu konsulti revuon "Esperanto", Aprilo 1961.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Vi povas pagi ankaŭ vian jarabonon al nia bulteno per 4 poŝtmarkoj je 0,25 NF.